Pri la genro de cervoj, estas malfacile distingi inter la du seksoj nur per postsignoj; la piedsignoj de malgranda blankvosta vir cervo, ekzemple, estas simila al tiu de granda cervino. Tamen, unu vico de grandaj piedsignoj, kiu montras ke iu besto vagas sola, tre verŝajne estas tiu de vir cervo. Simile vulpoj kaj multaj aliaj bestoj kutime vagas solaj. Kiam oni komencas trovi du vicojn de piedsignoj irantaj kune, tio estas indiko, ke la tempo de seksa pariĝo proksimiĝas.

Vulpoj, kojotoj – fakte la tuta hunda genro – ŝajnas kuri nerekte, t.e. kun korpo klinita flanken. Ekzemple, vulpo kuras rekte for de vi kun kapo kaj korpo klinita maldekstre; subite li ekturnas sin alidirekten – ankoraŭ rekte for de vi – sed nun kun kapo kaj korpo klinita dekstre. Kial? Nu,

natura eco pri la galopo de hundo estas, ke unu antaŭa kruro frapas la grundon unue kaj devas subteni la tutan pezecon; per turnigo aliflanken, tiu kruro ricevas ripozon.

Interesa fakto pri la studo de postsignoj estas, ke bestoj perfekte konscias, ke ili lasas postsignojn. La vulpo kaj kojoto elpensas tre lertajn ruzojn por konfuzi persekutantojn. Tamen, ili ŝajne ne komprenas, ke la homo sekvas postsignojn per okuloj, kaj ne per la nazo. Vulpo, kiun mi ĉasis, eniris arbustplenan valeton kaj dum eble kvaronhoro provis konfuzi min per faro de labirinto de piedsignoj tra la arbustoj. Tamen estis nova falo de nego kaj kiam mi venis sur monteton, kiu formis unu flankon de la valetto, mi tuj vidis liajn piedsignojn, forlasantajn la valeton je la alia flanko. Do, li tute malŝparis sian tempon!

La artifikoj, kiujn ili uzas estas treege lertaj. Unu aŭtunan tagon, je sunleviĝo mi ekvidis kojoton proksimume 150 jardojn distance, kaj provis ekpafi lin. Li estis severe vundita, sed li forkuris plej rapide – kaj de sunleviĝo ĝis meztago mi postsekvis tiun kojoton, sed eĉ ne unufoje vidis lin. Post tagmezo venis la unua indiko, ke li verŝajne iom laciĝis, ĉar post kiam li cirkulis kaj revenis al siaj samaj postsignoj, li kuŝiĝis iomete en herbeca valetto. Tie mi ektrovis lin – nur 30 futojn for – sed tiel rapida estis li, ke mi vidis nur strion de griza koloro, kaj li estis for.

Ĝis tiu tempo la ĉaso estis ordinara, sed nun la kojoto ŝajne decidis, ke pli da ruzeco estis necesa. Kiam li trafis la freŝajn postsignojn de alia kojoto li tuj turnis sin kaj kuris laŭlonge de tiuj, kaj poste rekte en la piedsignoj de la alia. Post nelonge la piedsignoj disiĝis, sed mi ne sciis, kiuj apartenas al *mia* kojoto, ĉar la du estis identaj. Verŝajne li venkis min. Tamen, mi postsekvis unu piedsignaron iom distance, kaj poste revenis al la alia. Mi estis bonŝanca. Kvindek jardojn antaŭe estis makuleto de sango: jen kion mi serĉis! Mi daŭrigis la ĉason. Kaj la kojoto iom malfortiĝis. Dufoje trifoje mi ekaŭdis lin forsalti de sia kuŝejo, sed mi ne povis vidi lin. Kelkfoje mi trovis liajn piedsignojn *sur la miaj*. Li nun transiris valeton, kie mefito estis kolektanta herbaĵon kaj foliojn por sia vintra dormejo; kaj jen la kojoto ruze konfuzis min denove. Li subite mallongigis siajn paŝojn kaj iris rekte en la piedsignoj de la mefito. Liaj postsignoj malaperis en la kruciĝoj de vojoj, kiujn faris la mefito. Dum duonhoro mi serĉis kaj serĉis, tute konfuzita. Finfine, kiam mi denove trovis liajn piedsignojn per marŝado en pli kaj pli grandaj cirkloj, mi ektrovis, ke la kojoto estis kuŝanta la tutan tempon en salikodensejo ne pli ol 70 jardojn distance, kaj mi supozas ke li kun granda intereso estis rigardanta miajn penojn solvi la enigmon de lia malapero.

Mi sekvis tiun kojoton dum la tuta tago, sed mi neniam kaptis lin. Mi tute ne dubas, ke li baldaŭ resaniĝis de la vundo, kaj eĉ hodiaŭ rakontas al siaj genepoj pri la tempo kiam li ruze venkis super la sperta ĉasisto.

Trad: Doris Connor



# FAKTOJ KAJ KRITIKAJ RIMARKOJ PRI LA ESPERANTO-LITERATURO

*William Solzbacher*

*Membro de la Akademio de Esperanto*

**L**A Esperantistaro prave estas fiera pri la riĉeco kaj varieco de la Esperanto-literaturo kaj ripetadas, ke ekzistas nun naŭ ĝis dek mil verkoj en kaj pri nia lingvo. Tio estas impresa nombro, sed en ĝi estas enkalkulataj malgrandaj broŝuroj kaj broŝuretoj, gazetkolektoj kaj presaĵoj tute efemeraj. Se oni konsideras ne nur la kvanton, sed ankaŭ la kvaliton, oni devas diri honeste, ke multaj libroj kaj broŝuroj en nia lingvo ne estas tre valoraj.

Persone mi havas la impreson, ke la proporcio inter bonaj kaj senvaloraj libroj en Esperanto estas proksimume la sama kiel en naciaj literaturoj, sed ke la procedoj, kiuj aŭtomate forigas kaj forgesigas multajn senvalorajn verkojn, funkcias malpli bone por Esperanto ol ekzemple por la anglalingva literaturo en Usono. Ĉiujare en Usono aperas miloj da libroj kaj broŝuroj, kiujn neniu gazeto recenzas kaj neniu serioza observanto priatentas. En multaj Esperanto-gazetoj aliflanke la kolonoj de la literatura parto estas plenaj de recenzoj, ofte laŭdaj kaj tute nekompetentaj, pri broŝuretoj sensignifaj kaj nelegindaj, kiuj estas fanfarone prezentataj kiel "valora pliriĉigo de la Esperanto-literaturo". La rezulto estas, ke multaj Esperantistoj estas trompataj, aĉetas senvalorajn verkojn anstataŭ bonajn Esperanto-librojn, seniluziiĝas kaj ĉesas aĉeti Esperanto-librojn, ne sciante, kiom da plezuro kaj kultura pliriĉigo ili perdas pro nekono de la veraj trezoroj de nia literaturo.

Unu el la kaŭzoj de tiu situacio estas historia. En la komenco de la movado, kiam broŝuroj en Esperanto kaj pri Esperanto aperis malofte, oni prave salutis ĉiun aldonon al la malgranda Esperanto-literaturo kiel sukceson kaj pruvon pri la progreso de la movado, eĉ se la nova verko havis neinteresan enhavon, pezan stilon kaj malbelan eksterajn. Nun la situacio estas malsama, kaj nia principo devus esti, ke unu bona kaj grava libro estas pli valora ol cent sensignifaj broŝuroj.

Alia kaŭzo eble estas la fakto, ke en la Esperanto-gazetaro la plimulto de la redaktantoj kaj recenzantoj estas amatoroj, kiuj neniam okupis similan postenon en nacilingva eldonejo. Ili laboras senpage, ofte eĉ subtenante la gazeton el sia propra poŝo. Ili estas avidaj kolektantoj de Esperantaĵoj kaj ŝatas havi plenan kolekton de ĉio, kio estas presata en nia lingvo. Tio kondukis al la stranga regulo, kiun oni trovas en multaj Esperanto-gazetoj: "Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias." La decido, ĉu verko meritas recenzon, do ne dependas de la redaktoro kaj de la verko mem, sed nur de la ricevo de du ekzempleroj. Ŝajne la klarigo estas, ke la unua ekzemplero de ĉio, kio alvenas, apartenas al la redaktoro (aŭ al la biblioteko de la gazeto), la dua al la recenzanto.

Mi konas neniun nacilingvan revuon aŭ gazeton, kiu havas tian regulon. Grava verko ĉiam estas recenzata, eĉ se la redaktoro devas aĉeti ekzempleron. Malgrava verko ricevas neniun atenton, eĉ se cent senpa-

gaj ekzempleroj alvenas al la redaktoro kaj liaj recenzistoj.

Kompreneble mi ne volas kritiki la utilecon de la praktiko de unu aŭ du Esperanto-gazetoj, prezenti kompletan bibliografian servon. Ili mencias ĉion, kio aperas en Esperanto aŭ pri Esperanto, kaj oni povas uzi iliajn binditajn jarkolektojn kiel fonton de bibliografiaj informoj. Sed la plimulto de la Esperanto-gazetoj ne povas kaj ne devus fari tion. Ili ne devas malŝpari sian paperon kaj la legotempon de siaj abonantoj por laŭdaj aŭ kritikaj rimarkoj pri malgravaj kaj neseriozaj eldonaĵoj. Honestaj, malkaŝaj, kompetentaj kaj kritikaj recenzoj, insista varbado por libroj altkvalitaj, nemencio de malgravaĵoj devus esti principoj de la Esperanto-gazetaro. Sed tio ne estas la sola problemo.

Oni ofte aŭdas la plendon, ke la Esperantistoj ne aĉetas sufiĉe multe da libroj kaj ke ili ne aĉetas tiujn librojn, kiuj estas plej gravaj por la progreso kaj venko de nia movado.

Fakto, kiun oni ofte forgesas, estas, ke pli ol 70 procentoj de la Esperanto-literaturo konsistas el lernolibroj, vortaroj kaj propagandaj broŝuroj nacilingvaj. La cifero estus eĉ pli alta, se oni konsiderus la nombron de la ekzempleroj presitaj. Tiu fakto ne estas malbona en si mem, ĉar ĝi ja indikas, ke Esperanto penetras en novajn rondojn kaj altiras lernantojn. Tamen ĝi signifas, ke la nombro de nur-Esperantaj verkoj estas ne pli granda ol tri mil. Ĝi ankaŭ indikas, ke ekzistas inter ni tro multaj "eternaj komencantoj", kiuj neniam finlernas la lingvon.

Alia fakto, kiun raportas la eldonistoj, estas, ke plej facile disvendigās detektivromanoj kaj distraj verkoj sen vera literatura valoro kaj ke oni perdas monon per publikigo de sciencaj kaj altkvalitaj literaturaj verkoj. Eble oni ne devus esti tro severa pri la detektivromanoj. Legante ilin en Esperanto anstataŭ nacia lingvo, niaj komencantoj kaj progresantoj povas ekzerci kaj plibonigi sian Esperanto-scion. Aliflanke estas evidente, ke la ekzisto kaj disvendo de tiaj verkoj ne pruvas multe pri la literatura valoro de Esperanto. Neniu bezonas lerni Esperanton por ĝui tiajn legaĵojn, kiuj abundas en ĉiuj lingvoj.

Pri la faka kaj scienca literaturo oni ankaŭ devas diri, ke ne la kvanto, sed la kvalito prezentas problemojn. Se oni ekzamenas ekzemple la Esperanto-literaturon pri ekonomiaj kaj sociologiaj temoj, oni povas prepari longan kaj impresan liston, en kiu imponas ankaŭ la granda nombro de la landoj, en kiuj la libroj aperis. Sed pli detala analizo montros, ke preskaŭ ĉiuj verkoj sur la listo estas propagandaj broŝuroj aŭ libroj pri diversaj neortodoksaj kaj neordinaraj ideologioj kaj teorioj. Kelkaj el ili sendube havas aŭtentikan sciencan valoron, sed tiu valoro koncernas pli la periferion ol la centron de la koncerna scienco. Severe sciencaj verkoj pri ekonomiaj kaj sociologiaj temoj, kiuj respegulas la nunan staton de tiuj sciencoj en ĝiaj esencaj trajtoj, ĝis nun ne ekzistas.

Natursciencaj verkoj nun haveblaj estas ĉefe popularsciencaj. Sciencisto ne lernos nian lingvon por legi tiajn librojn, sed nur, se la lingvo permesas al li, legi kaj publikigi la rezultojn de novaj sciencaj esploroj. Tio evidentigas la gravecon de Esperanto-resumoj en sciencaj gazetoj. Ili ankoraŭ ne estas tre multnombraj, sed oni devus pli bone utiligi kaj diskonigi tiujn, kiuj ekzistas.

Mi scias, ke mia artikolo enhavas pli multe da demandoj ol respondoj. Tiuj demandoj meritas seriozan ekzamenon. La problemoj ne plu estas la

“pliriĉigo de la Esperanto-literaturo” laŭ kvanto aŭ la “havigo de interesaj legaĵoj al la Esperantistoj”. Legindaj Esperanto-libroj jam estas pli multnombraj ol eĉ la plejentuziasma Esperantisto povas legi dum sia tuta vivo. La problemo estas, eduki kaj instigi la Esperantistojn, ke ili legu kaj aĉetu pli multe da libroj, ne nur por pliperfektigi en Esperanto, sed ankaŭ por rikolti kelkajn el tiuj kulturaj, sciencaj kaj praktikaj valoroj, pri kiuj ni tiel ofte parolas en nia propagando.

La dua problemo estas, trovi metodojn por publikigi ne iajn Esperanto-librojn, sed precipe librojn, kiuj demonstracios la utilecon kaj gravecon de la interlingvo kiel perilo inter naciaj kulturoj kaj kiel helpilo de internacia kunlaboro en ĉiu grava fako. Estas evidente, ke kelkaj el tiuj libroj ne povas esti financataj el la vendoprezco. Ili bezonas eksteran financan subtenon, kiel multaj sciencaj kaj fakaj verkoj en naciaj lingvoj bezonas financan subtenon. Tia financa subteno eble estus trovebla, se ekzistus plano praktika kaj konvinka kun konkreta laborprogramo.

La malfacilaĵoj en la transpago de mono de unu lando al alia estas alia barilo al la disvastigo de la Esperanto-literaturo. En Nord-Ameriko ni feliĉe havas libroservon, kiu povas liveri Esperanto-librojn publikigitajn en la tuta mondo, inter ili la librojn plej altkvalitajn kaj valorajn. Niaj membroj kaj legantoj devus pli multe profiti tiun fakton ol ili tion faris ĝis nun.

### THE BEST IN ESPERANTO LITERATURE – DE LUXE EDITIONS

- Kon-Tiki, Heyerdahl*, exciting true adventure story of six men on a 40-foot raft, 80 fotos, 236 pages, stamped in gold, full-cloth..... \$ 3.90
- Gösta Berling, Lagerlöf*, strange, fascinating novel of adventure and love in rural setting of old Sweden, 552 pp, full-cloth..... 3.90
- Peer Gynt, Henrik Ibsen*, story in poetic form of wild adventure, impulsive love, colorful scenes of Norwegian life, 258 pp, cloth 2.30
- La Normandaj Rakontoj, Guy de Maupassant*, 19 delightful stories, richly illustrated, 210 pp, stamped in gold, grey-brown cloth..... 3.60
- Tipoj kaj Aspektoj de Brazilo*, fascinating details of the life of Brazil, 151 pp. incl. 36 full-page drawings, art leatherette bound 4.00
- Fine, Nun Mi Komprenas la Radion*, popular introduction to the technics and theory of radio, richly illustrated, 142 pp, half-cloth 2.50
- Sveda Antologio*, selections from the very best in Swedish literature, Parts I & II in two de luxe vols., 432 pp, blue cloth, *complete* 5.85
- Svisa Antologio*, translations from the four languages of Switzerland, with linguistic comments, 540 pages, full-cloth bound..... 5.85
- Ĉeĥoslovaka Antologio*, rare, complete anthology of Czech & Slovak literature, 32 art illustrations, 500 pages, half-cloth..... 6.85
- Sep Fratoj, Kivi*, a robust, hilarious tale of seven brothers in the rural Finland of long ago, 360 pp, 34 illust., bound in boards..... 3.00
- Dante: Infero*, rare, a monumental translation from the Italian, in original verse form, 16 full page illust., 304 pp, half-cloth..... 5.60

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

**Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.**



## ESPERANTA KRONIKO

**Grandan ekspozicion pri Esperanto** en la biblioteko de Allentown, Pa., aranĝis *Donald Munro*. Aperis ampleksaj raportoj pri la ekspozicio en la tagjurnaloj. S-ro Munro uzis en tiu klopodo la "vojaĝantan ekspozicion" de EANA, kaj aldonis ilustraĵojn pri la praktika uzo de Esperanto.

**Elizabethtown-Kolegio** en Pensilvanio okazigis regulan kurson de Esperanto dum la aŭtuna sezono. *Profesoro F. C. Neumann* gvidas la kurson per utiligo de libroj kaj diskoj de la "Connor Course".

**En la gazeto de la "Monday Afternoon Club"**, Plainfield, N. J., aperis longa artikolo verkita de *Muriel Collins Lambert*. Ŝi rakontis pri la Kongreso de EANA en Nov-Jorko, pri la nunaj klopodoj ĉe UNESCO, kaj pri la spertoj de Zamenhof dum li kreis la interlingvon.

**Novaj kursoj de Esperanto** komenciĝis lastatempe: En Nov-Jerzio, S-ro *John Salles* gvidas grupon de 5 studentoj. En Delavaro, D-ro *D. R. Lincicome* raportas pri granda entuziasmo en grupo de 15 personoj, kiuj regule studas sub lia gvidado. En Kalifornio, S-ino *Blanche Parker* komencis kurson por dek amikinoj de sia 13-jara filino *Barbara*, kiu vekis la intereson de la kunulinoj, kiam ŝi montris al ili siajn Esperanto-librojn. En Sacramento, Kalifornio, F-ino *Ilda Belle Craig* instruas kurson en la Vespera Altlernejo. En altlernejo de Warwick, N. Y., *Roy Epting* instruas Esperanton al 25 lernantojn en 7a kaj 8a studjaro. En Kolegio St. Xavier, Chicago, *Pastro G. N. Pausback* komencis novan kurson.

**William P. Vathis**, kiu ĵus revenis post du-jara restado en Hong Kong, paroladis la 6-an de Januaro en kunveno de la Esperanto-Societo de Nov-Jorko. Li montris belegajn kolorbildojn pri sia vizito en Bangkok.

**La Esperanto-Klubo de Detroit** festis Zamenhof-Tagon per speciala kunveno. Japana gasto, S-ro *Koji Akizawa* donis demonstracion pri sia hejmlanda muziko. *Bernard Haag* prezentis per ruband-fonografo la ĉef-okazintaĵojn de la 43-a Kongreso de EANA.

*Laŭlonge similas al densa arbaro,  
Laŭlarĝe mi pensas pri ondplena maro.*

**Abstrakta Arto:** Arto estas simple la esprimo de homa emocio en ia formo. Jen estas ekzemplo de "abstrakta" arto, kiu ne plaĉas al ĉiu. Povas esti, ke vi diros, "Ĉu la bildo montras beston, birdon, aŭ fiŝon?" aŭ eĉ, "Ĉu ĝi estas makaronio?" Tamen, ĉi tiu formo havas unu avantaĝon. Oni povas pendigi ĝin vertikale aŭ horizontale, se la artisto ne subskribas sian nomon. Kaj multaj el ili vere ne devus! Serioze, tiuj flujaj linioj, teksantaj malantaŭen en agrabla maniero, ensorĉas min. Mi opinias, ke la desegno estas alte dekoracia kaj taŭga por drapira ŝtofo. Tial mi demandis la artiston, "Kiel vi nomas la bildon?" Li respondis, "Nura skribato." Ho—mi forgesis diri, ke mia kvin-jara filo faris ĝin en infanlernejo. —*Edna MacDonald*



## DEZIRAS KORESPONDI

*Kosto de anonco: Eksterlande, unu vorto aŭ mallongigo por unu cendo (ses vortoj por 1 int. respondkupono); Enlande, unu vorto por du cendoj.*

- Alĝerio.** S-ro R. Accomiato, T. S. F., *Fort-de-l'Eau* (Alger). Dez. kor. per leteroj aŭ PK kun amerikaj gesamideanoj, pri ĉiuj temoj.
- Grekujo.** D-ro Anakreon Stamatiadis, Str. Rodou 23, *Athenai* 8.32 re-klerigataj instruistoj deziras korespondi kun samprofesianoj.
- Hispanujo.** Jose Alvarez, Olzinellas 107 B, *Barcelona*. Deziras korespondi per il. PK kun Nord-Amerikanoj.
- Hispanujo.** Martin Asencio, Calle Industria N. 485, Estr. 1<sup>a</sup>, *Barcelona*. 19-jara junulo dez. kor. kun fraŭlino 16-18 jaraĝa.
- Hispanujo.** Jorge Quinanilla, Nuria 21 - 1<sup>o</sup>, *Barcelona* (Elot). 19-jara junulo dez. kor. kun fraŭlino, certe respondos.
- Japanujo.** Toŝikazu Tanino, 15 Fuĉu-maĉi, *Neigun*, Tojama-ken. 19-jara lernanto dez. kor. pri sporto, muziko, danco kaj PM.
- Japanujo.** F-ino Toyoko Tsutumi, 1-53 Sansōdōri, *Hukuoka-si*. 19-jara dez. kor. pri muziko, literaturo, socia scienco.
- Kanado.** Harold Mason, 496 Grosvenor St., *London*, Ont. 26-jara, mez-lerneja eduko, dez. kor. pri diversaj temoj, ekz. lingvoj, kutimoj.
- Portugalujo.** Marcos dos Santos, Rua Augusta 176-4<sup>o</sup> Dto., *Lisboa*. Dez. kor. kun usonaj fraŭlinoj 20 ĝis 30-jaraj. Interŝanĝas PK.
- Portugalujo.** H. T. Gomes de Freitas, *Airport de Santa Maria*, (Acores) Azores. Dez. interŝanĝi PM kun ĉiulandaj filatelistoj.
- Usono.** Louis Kruh, 37-41 81 St. *Jackson Heights*, N.Y. 31-j. komencanto interŝanĝos fotojn de Hollywood-geaktoroj kontraŭ Esperanto-gazetoj, libroj, ĵurnaloj, ktp. Ankaŭ dez. kor. kun profesiaj reklamistoj.
- Usono.** David Bartholomew, 819 S. 3rd Ave., *Bozeman*, Montana. Dez. kor. pri speciala eduko de korp-difektuloj.
- Turkujo.** Ali Akyol, Ihsaniye Caddesi No. 34, *Konya*. Dez. iŝ. il. PK.

### EANA & UEA MEMBERSHIP DUES FOR 1954

The Central Office has enjoyed serving the members of EANA during the past year. It is now time for many of you to renew your membership for 1954.

All categories of EANA membership receive the *American Esperanto Magazine* and all *Bulletins*. Your EANA membership automatically gives you "associate membership" in the international association UEA. You receive coupons (called "membromarkoj") of UEA, and have a right to services of delegates throughout the world.

In addition there are "individual membership" categories in UEA: the *Yearbook* (containing lists of delegates) is supplied for an additional \$1.25 annually; the *Yearbook* and magazine *Esperanto* (monthly) are supplied for an additional \$3.00 annually.

Now is the time for you to renew your membership in your North American association EANA, and in the general international association UEA. Here are the combined membership rates for 1954:

	<i>Armed Forces, H.S. &amp; College</i>	<i>Active Member</i>	<i>Patron Member</i>
EANA Membership & associate of UEA:	\$3.00	\$5.00	\$10.00
EANA Membership & <i>Yearbook</i> of UEA:	\$4.25	\$6.25	\$11.25
EANA Membership with <i>Yearbook</i> and magazine <i>Esperanto</i> of UEA:	\$6.00	\$8.00	\$13.00

## NEW ESPERANTO BOOKS FOR YOUR READING ENJOYMENT

The Central Office is equipped to supply all your book needs. When you buy books from the "Esperanto Book Service" all profits are used to give you a better magazine and office. Place all your orders through the "Esperanto Book Service".

LA JUNAJ DETEKTIVOJ, J. H. Sullivan, A short novel for children of all ages, high adventure looking for smugglers, simple language, 43 pp.....	\$ .35
LA NORMANDAJ RAKONTOJ, Guy de Maupassant. 19 delightful stories, 8 full pages of pictures of Normandy, 210 pp. in all, stamped in gold, cloth	3.60
DEVENO KAJ VIVO DE LA LINGVO ESPERANTO, P. Stojan. A highly subjective but thought-provoking essay on Esperanto, 110 pp.....	.75
POST LA KURSO, W. & H. Wingen. A reading and study book in Esperanto and German, for use by more advanced students, 100 pp. illustrated.....	1.25
SCHLÜSSEL ZU "POST LA KURSO", W. & H. Wingen. A Key to above, 54 pp.	.45
FINGRULINO, Hans Chr. Anderson. Translation of the famous fable of the tiny "Thumbelina", beautifully illust. in brush water colors, 18 pp. Boards	.60
TUTMONDA LAŬDO, H. G. Wannemakers, S. J., Catholic prayerbook, including several religious songs with music, illustrated, 277 pp.....	1.50
LETERO EL LA TRANSCENDO, A. B. Krempel. A religious and moral book giving advice and experiences from beyond the grave, 36 pp.....	.45
KVAROPO, poems by 4 Esperanto poets. A nicely printed collection of varied poems: lyrical, melancholic, erotic, philosophical, 270 pp. card covers	1.65
LA ALIA PASINTECO, R. Bultuis. The story of a victim of amnesia, and how he discovered his real self through sympathetic help, 292 pp....	1.85
NIKO KAJ NINO, J. F. Berger. Easy reading in original Esperanto, the story of childhood and youth in prewar Germany, 71 pp, illustrated.....	.80
KLASIFO DE ESPERANTAJ TEMOJ, Montagu Butler. Scientific analysis & full details for adapting the decimal system of classification, 144 pp.....	1.75
SPIRITAJ EKZERCADOJ, Sankta Ignacio de Loyola. 370 diversified spiritual meditations, prayers, etc., translated from the original Spanish.....	.30
KIEL AŬTODIDAKTO AL PEDAGOGIA SCIENCO, K. Wieczorek. An essay on the history, art and psychology of teaching, 39 pp.....	.60
ĈU VI DEZIRAS KORESPONDI?, Margrethe Noll. Advice on Esperanto correspondence with model letters, phrases, announcements, etc., 16 pp.....	.15
ESPERANTA LEGOLIBRO, E. Migliorini. Selected stories, anecdotes and graded reading, 3rd edition, revised and enlarged, 187 pp.....	.80
ALASKA STAFETO kaj KAPTITAJ DE LA GLACIROKOJ, F. Omelka. Two stories of daring and adventure in the wild north, illustrated, 96 pp. cloth	1.10

(Members of EANA deduct 10% from above prices.)

## FILM STRIPS WITH SEPARATE TEXT OF ESPERANTO COMMENTARY

35 mm film strips of non-inflammable celuloïd—picture size 18 x 24 mm.

Published by the Esperanto Film-Grupo in the Netherlands

435/1 La antikva Grekujo.....	\$ 1.85	399/12 Borneo laŭ bildoj.....	\$ 2.20
160/2 Inter la Araboj.....	1.45	146/13 Zelando kiel turistregiono	1.25
447/3 Lando kaj popolo de Siamo	1.70	327/14 Palestino, norda parto....	1.95
500/4 Javo (Indonezio) 1a parto	1.70	328/15 Palestino, suda parto....	1.80
501/5 Javo (Indonezio) 2a parto	1.80	158/17 Tibeto, lando de lamaoj	2.00
143/7 Sovaĝaj bestoj de Afriko..	1.85	159/18 Indianoj kaj Eskimoj.....	2.00
397/8 La vizaĝo de la terglobo..	2.00	186/19 Laponoj kaj Fimnoj.....	2.10
437/9 Meksikio, lando kaj popolo	1.80	19/27 Danujo, lando kaj popolo	2.10
419/10 Marvojaĝo al Indonezio....	2.10	F.112 Viena Esperanto-Muzeo..	1.80
326/11 La mirinda Nilolando.....	2.25	F.113 La akvokatastrofo.....	2.10

Film strips are sent postpaid directly from the Netherlands. Esperanto Commentary only (without films) may be purchased at one half above prices. No discounts on these prices. Send all orders and payments to:

Esperanto Book Service, 114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

## NEW CONNOR COURSE IN ESPERANTO

Correspondence Course with Vinylite Records  
Instruction by Doris Tappan Connor

New! Modern! The "Connor Course" is unique, — it provides real-life disk conversations plus the personal instruction of Doris Tappan Connor. The one and only record course, in any language, that gives *everything* in the way of learning aids. NOW, you can learn Esperanto like a "native" — *better, quicker, and easier*. It's fun to learn this real-life way! You *converse* with the disk and *confer* with the instructor. The "Connor Course" is compiled by experts. "Vinylite" recordings by Mr. and Mrs. Connor. All designed so you can *master* Esperanto.



The complete "Connor Course" includes the following:

- (1) A lively text, "Esperanto: The World Interlanguage."
- (2) Eight complete "Vinylite" double-sided 10" records.
- (3) A practical and easy-to-follow "Study Guide" (82 pp.)
- (4) Personalized instruction and guidance of Mrs. Connor.
- (5) Supply of answer paper and printed return envelopes.
- (6) An interesting card game, to develop your vocabulary.
- (7) And finally, an official "Certificate of Achievement".

**FOR INDIVIDUAL STUDY:** The complete "Connor Course", as described above, will be sent postpaid for only \$36.

**FOR GROUP STUDY:** Buy one complete master course at \$36. Each additional member pays only \$6 more for Textbook and complete Study Guide for his own use.

Full money-back guarantee. So, place your order NOW:

**Esperanto, 114 W. 16th St., New York 11, N. Y.**